

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gilli Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabriko-
direktoro, Kaunas.

N-o 171
23. 12. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifo

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona
al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La interna ideo.

Oni jam pridiskutis en la kolonoj de ET la demandojn pri la ideo de nia movado. Cetero mi havis okazon en la pasintaj jaroj aŭskulti de iuj idistoj, ke la „interna ideo“ estas arbitre elpensita de la Esperantistoj „amuzajo“, kiun ili mem ne bone komprenas. Pro tio mi pensas, ke ne estos superflue publikii la sube donatan eliraĵon el mia referato „Pri la Esperanta literaturo“, farita en kunveno de soĉiaj Esperantistoj. Parolinte pri la naciaj literaturoj kaj pri la tuthomaraĵ elementoj en ili, kiuj ilin faras kompreneblaj kaj propraĝblaj al ĉiu homo, mi diris:

„Sed kiu ne scias ke, se vi parolas pri greka, latina, franca, germana, bulgara ktp. literaturoj, ni uzas samtempe la terminojn: kristanisma literaturo, socialisma literaturo; ni diras: la vegetarana literaturo en bulgara lingvo pliriĝis per nova verko, aŭ: ni ne havas grandan anarkiisman literaturon, ke. Kion montras tio? — Ke ni dividis literaturojn ne nur laŭ nacioj, sed ankaŭ laŭ ideoj, laŭ sociaj movadoj. Ĉiu ideo bezonas sian specialan literaturon kaj kreas ĝin.

Nu, se Esperanto portas en si ideon, tiu ĉi ideo bezonas sian specialan kaj specifikan literaturon.

Tiel ni venas al la demando pri la interna ideo de la Esperantista movado.

„Ni ĉiuj scias, kio estas Esperantismo en rilato praktika“, diris Zamenhof en sia dua kongresa parolado (Genevo, 1906). Li aludas la Oficialan Deklaracion de la Bulonja Kongreso.

„Sed,“ daŭrigas Zamenhof, „krom la flanko praktika, deviga por ĉiuj kaj montrita en la Deklaracio, la Esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan — flankon idean. Tiun ĉi flankon diversaj Esperantistoj povas klarigi al si en plej diversa maniero kaj en plej diversaj gradoj. Tial, por eviti ĉiun malpacon, la Esperantistoj decidis lasi al ĉiu plenan liberecon akcepti la internan ideon de Esperantismo en tiu formo kaj grado, en kiu li mem deziras, aŭ — se li volas — eĉ tute ne akcepti por la Esperantismo ian ideon.“

Kristnaska antaŭvespero de kuracisto.

Ankoraŭ sur sojlo, D-ro Zawirski sin turnis al siaj kolegoj kaj demandis ilin preskaŭ petege:

„Do vi diras, ke ne ekzistas jam savo?“

„Ambaŭ doktoroj ekrigardis unu la alian kvazaŭ kun miro, sed la pli maljuna respondis pacience:

„Dufoja injekto donis nenian rezultaton. Ni provis ĉiujn rimedojn. Sed ni vidas, ke nia rolo estas finita... ni povas ĉi tie jam nenion helpi...“

„Jam nenion... Kiel longe vi supozas ke la infano vivos ankoraŭ?“

„Kiel longe?“

„Tio estas... mi pensis pri horoj...“

„Kelkaj horoj... jes... eble...“

„Pri tio, oni neniam povas opiniĝi certe,“ enjeto la pli maljuna kuracisto, al kiu longjara praktiko kaj sperto instruis pli grandan singardemon eĉ eldoro de absolutaj juĝoj. „Ĉial la infano ne turmentigos.“

„Mi dankas vin, kolegoj... ke vi riskis tian longan vojon...“ ekurmuretis D-ro Zawirski, kiu dum ĉi tiu parolado kun peno estis kapabla teni pli ekvilibran.

Dume la du kuracistoj jam sidigadis en larĝa glitveturilo, ĉirkaŭvolvante la piedojn senfende per pelta antaŭtuko. La pli juna eligis poŝhorloĝon kaj kun zorga mieno kalkulis, je kia horo li estos en la urbo. Estas ja antaŭvespero de kristnasko, festo familia, kiu postulas, ke ĉe hejma fajrujo arigiĝu ĉiuj familianoj.

PRO la venontaj festotagoj la hodiaŭa numero de ET ne enhavas aktualajn sciigojn, sed precipe literaturajn. La venonta numero (172) aperos en la kutima arango.

Al ĉiuj niaj kristanaj abonantoj ni deziras gojigan kristnaskan feston!

Tiel parolis Zamenhof pri la interna ideo. Kaj ne nur tiam li parolis pri ĝi. En liaj kongresparoladoj la interna ideo estas ĉefmotivo.

Ni vidu, kia estas tiu ĉi interna ideo.

Unue, kio kreis la internacian lingvon? — Internacia lingvo estas kreita, por doni al la homoj de diversaj nacioj rimedon por reciprokaj rilatoj, por komunikigo, por ke ili ekkonu sin. Do, kreigan kaŭzon por helplingvo donis la celado al internacia vivo.

Per si mem la celado al internacia vivo, la emo vivi la vivon de la tuta homaro, estas ideo socia. Tiu ĉi ideo igas la homojn konsideri la ceterajn popolojn fratoj. Tiu ĉi celado detruas la inklinojn vivi aparte, fermite en ĉiuj muregoj; ĝi kreas la konvinkon, ke la tuta homaro devas evolui ne interbatalante, ke la diversaj popoloj devas vivi ne kiel rivaloj kaj malamiko, ne ĉiam penadi, sur la malfeliĉon de la ceteraj konstrui sian propran feliĉon, sed ke la popoloj, kiel ankaŭ la apartaj homoj, devas toleri sin reciproke, estiĝi sin, helpadi sin. Tiu ĉi ideo estas la internaciismo.

Ne estas nova tiu ĉi ideo, kvankam la komencaj vortoj de ĝi nia ĥimo estas: „En la mondon venis nova sento.“ Kontraŭe, la ekzisto de tiu ĉi malnova ideo, ĝia jama urĝeco, alvokis la kreon de internacia lingvo. En la plej malproksima antikveco mem oni sciis ke, se du najbaraj popoloj ne estas en stato de milito, ili sin helpas reciproke, ili faras komercajn interŝanĝojn, ili estas amikaj popoloj. La poetoj glorigis la militon, sed ili kantis ankaŭ belajn kantojn pri la paca vivo kaj pri la kunlaboro de ĉiuj najbaroj.

La ĉevaloj, sentante sur dorso elsireĉitaj la kondukilojn, ekkuris per rapida trot.

Sur la sojlo de l' domo staris ankoraŭ D-ro Zawirski, senmova, glaciigita kaj per la orelo kaptis la lastajn sonoril-sonojn de l' malproksimiganta glitveturilo; sur la neĝa vojo ĝi flugis, forportante kiel sago lian lastan esperon...

Ce la mortanta infano maldormis la patrino. Li ne havis forton vidi sin en ĉi tiu momento, do li reiris en sian kabineton.

Mehanike li komencis turni la paĝojn de la medicina libro, sed li forjetis ĝin... apogis la fronton sur siaj plektitaj manoj, penis koncentrigi sian atenton... Eble... eble... ia nova penso... ia eltrovo en ĉi tiu scienca sfero.

Kaj la vespero proksimiĝis, malĝoja, decembra...

Tra unu el la angulaj fenestroj oni rigardis sur malnovan urbeton, kun mallarĝaj stratoj kaj malgrandaj lignaj dometoj, vaste disjetitaj sur deklivoj de l' karpataj montoj; je alia flanko la pejzaĝo plimalaliĝis iom malsupren... ĝin dense kovris piceoj, surŝuitaj per blankajo de pruĝo.

D-ro Zawirski enprofundiĝis en pensojn... Kiel kutime en tragediaj momentoj, antaŭ liaj okuloj aperis lia tuta vivo. — Bildoj preterŝoviĝis unu post alia...

Batalo kun malsufiĉo, tiu forto malbonaŭgura, reganta la plimulton da homaj ekzistajoj, ankaŭ en lia vivo estis akso, ĉirkaŭ kiu turniĝadis ĉiuj aspiroj kaj klopodoj. Kaj la bezonoj kreskis kun preskaŭ ĉiu tago. Edziĝite juna, sen havaĵo, li fidis nur sian propran laboron.

Vere, finitaj studoj universitataj donis al li ceriecon de almenaŭ estonte garantiita ekzistado;

Kiam la popoloj estis turmentataj de militado, ili turnadis sian okulojn sopire al la feliĉa vivo dum la paco. En tiu sopiro ni ankaŭ povas malkovri la embrion de la internaciismo, de la ideo, ke la nacioj vivu kaj disvolviĝu pace, harmonie, amike kaj interhelpe sin.

Kiam post milito — kiel en antikvaj tempoj, tiel ankaŭ nun — oficialaj senditoj kunvenas por fari pacan kontrakton, tiam vortoj de amikeco, deziroj al kunlaborado interpopola, solidareco — estas solene elparolataj. La internaciismo parolas tiam per la buŝoj de la oficialuloj.

Do, de la antikvaj tempoj ĝis nun oni vidas la savan, feliĉan staton de la homaro nur en la paco kaj la amika intervivo de la nacioj. La simplaj popolamasoj kredis tiam sincere, la gvidantoj de la popoloj sorto deklaris ĝin plej ofte kun politika malsincereco kaj ruzemo, tamen iom post iom tiu ĉi ideo enradikiĝis en la konscion de la homaro.

La kristanismo, kreita kiel universala filozofio de l' vivo, destinita por ĉiuj, sanktigiĝis tiam ĉi ideon.

Poste, precipe en pli novaj epokoj, kiam komencis naskiĝi la sociaj ideoj, celantaj la plibonigon de la homa sorto per plibonigo de la socio, la internaciismo vastiĝis ankoraŭ pli multe.

La internaciismo konstante kreskadis kune kun la plioŝtigo de la komunikoj kaj rilatoj inter la popoloj kaj paralele al la grad-post-grade plidemokratiganta emo al tial rilatoj. La internaciismo estas nepra bazo de ĉiu socia ideo: ja neniu povus prezenti al si religion, socialismon, anarkiismon kaj kiun ajn ismon, kreitan nepre nur por unu aparta gento aŭ popolo.

Mi jam diris, ke la internaciismo, kiu nun estas progresinta ĝis supera grado, kaŭzis la aperon de internacia lingvo.

Cu ni, kiuj deziras disvastigi la internacian lingvon, por doni al la popoloj eblon intertali kaj ekkoni sin, ne laboras en efektiveco por tiu ĉi ideo?

Pro kio ni ne nur lernas Esperanton, sed ankaŭ laboras por ĝia disvastigo? Per kio Esperanto altiras nin? Cu nur per tio, ke ĝi estas facila kaj perfekta? Cu por tio, ke la substantivo finiĝas per o, la adjektivo per a ktp.? — Se

sed en granda urbo por komencantaj kuracistoj, atingo de konstanta praktiko estas demando de jaroj, kaj li devis vivi ĉiutage.

Tamen laste ekridetis sukceso.

Vokadis ofico de kuracisto en soleca, montara anguleto, de post preskaŭ dek jaroj senigita de kuracista ŝirmo. Neniu juna kuracisto volis peregi sian talenton kaj forton en tiu enabismigita loko kun severa klimato; neniu logis restado inter loĝantoj kvankam laboremaj kaj honestaj sed sen ia kulturo. Vane la komunumo, timigita per terura mortado de infanoj, oferis eĉ fiksan salajron al doktoro: neniu kuracisto aperis.

D-ro Zawirski decidis akcepti ĉi tiun okupon. Inklinigis lin mil konsideroj de praktika naturo; la promesa fiksa salajro, absoluta manko de konkurenco, komfortoj de materiale certigita vivado ktp.

La doktoron oni akceptis kiel savonton. Ne pasis ankoraŭ unu jaro, kiam li jam ekamis sian anguleton kun tuta animo. Ĉirkaŭis lin ĝenerala amo, konfido kaj estimo de la homoj, kaj la hejma fajrujo plenigis la mezuron de lia feliĉo.

Lia amata Stefanino, ne satana amuzojn kaj grandurban bruon, ĉi tie — sur la fono de sovaĝa, montana naturo — disvolviĝis kiel belega floro, kaj ŝia belsona kantado, kiel argenta sonorileto disvastigadis ira ĉiuj ĉambroj de mateno al nokto.

Baldaŭ rozkolora, grasa etulo gajigis ilian ĝis nun solecan hejmon.

Bonstato materiala kreskadis; estis neniam urbeeto, vilaĝeto en ĉirkaŭajo, en kiu ne almenaŭ unufoje la doktoro sukcesis forpeli malfeliĉon.

La loko abundis de multaj familioj. La nombro da infanoj tamen plimalgrandiĝis rapide kaj fortege; kulpa estis tio, ke oni ne plenumis la plej ele-

nur pro tio, ridinda estus nia penado, nia perdo de tempo. Sed ni scias, ke Esperanto povas alporti bonon al la homaro. Ni scias, ke la popoloj estos pli feliĉaj, kiam la rilatoj inter ili plimultiĝos. Ni deziras, ke tio ĉi okazu. Jen tiu deziro estas la interna ideo de la Esperantismo, kiu impulas la tutan movadon, kiu kreas la pacajn, nekonatajn herojn.

Sed en la Esperantismo, krom la ĉefa bazo — la internaciismo — ni trovas ankaŭ alian elementon. Ĝi estas entenata en la nomo mem de la lingvo kaj de la ideo. La espero pri la estonta pli feliĉa stato, la kredo, ke io pli bona estas atingebla, tio estas la dua elemento en la interna ideo de l' Esperantismo.

Ankaŭ tiu espero ne estas io nova, veninta kun Esperanto. Ankaŭ ĝin ni vidas en la vivo de l' homaro dum ĝia tuta disvolvigo. Ĝin ni vidas kiel konstantan elementon en ĉiu ideo. Se oni deziras krei ion bonan por la homoj kaj oni komencas labori por ĝi, oni jam kredas, esperas, ke ĝi estas atingebla. Sen tia espero neniu komencus labori. La espero instigas la homojn penadi plibonigi la vivon kaj krei la kulturon. Pro tio la plej bonaj poetoj trovis belajn parolojn por ĝin glorigi. La malespero estas stato de senmoveco, ĝi forprenas la fortojn de homo. La espero estas movilo de la progreso. En la sociologio tiu ĉi kreanta faktoro — la espero — estas nomata historia optimismo.

Unu el la plej frapantaj trajtoj de Zamenhof estis lia firma kredo, ke tio, kio devas esti, povas esti. Dum sia tuta vivo li esperis. Li trafis elektis sian unuan pseŭdonimon „Esperanto“. La Esperantistaro bone komprenis kaj taksis tiun karakterizadon de sia Malfro. Al ĝi plaĉis la historia optimismo de tiu ĉi homo, optimismo nevenkita de la multaj malhelpoj kaj malfavoraj cirkonstancoj. Ĝi adaptis tiun ĉi optimisman kaj donis la belan pseŭdonimon de Zamenhof al la lingvo internacia mem. Ĝar ja la lingvo estis kreita por bono de l' homaro kaj portas en si tiun optimismon, tiun fortan kredon, ke la homoj povas esti homoj, ke en la homaro povas ekregi homeco.

Ni do vidis, ke la Esperantismo entenas du elementojn: la internaciismon kaj la historion optimismon, ambaŭ aperadintaj en diversaj epokoj kiel elementoj de diversaj sociaj ideoj, ke ili estas pli maljunaj ol Esperanto mem, kiu ilin nur emancipas kaj apartigas el la ceteraj sociaj ideoj.

At. D. Atanasov, Sofia

La ekkulturisto.

De Friedebert Tuglas.

I.

Antaŭe ĉi tie bruis praarbaro, kies koron malofte tuŝis piedo de homo. Dekojn da verstoj etendiĝis la sovaĝa ebenaĵo kun mallumaj densarbaroj kaj muskomarĉoj, kien ne povis enpenetri eĉ la pli grandaj bestoj. Longkruraj gruoj loĝis ĉi tie, sur izolaj marĉinsuloj ili konstruadis la nestojn, de printempo ĝis aŭtuno ili kaptadis ranojn plaudante en la malprofunda akvo. Grandare aperadis ĉi tie: skolojoj, vaneloj, sovaĝaj anseroj kaj anasoj, por denove flugi aŭtune en longaj linioj sub la griza ĉielo al la sudo. En la densarbaro estis hejmo de gelupoj. Malproksime de marĉoj kaj lagoj, sub la fortikaj radikoj de kliniĝinta pino, maldiligenta urso pasigis la tagojn de sia maljuneco.

mentajn regulojn de higieno, ne konis la plej simplajn sanigilojn kaj domajn rimedojn.

D-ro Zawirski do antaŭe ĉi direktis sian tutan energion, preskaŭ furiozon al la klerigado de l' patrinoj. Ĉi tiu prepara laboro celis en plej proksima estonteco elŝiri de morto iro oftajn oferojn.

Per kia maldankeco por tiu fervoro la sorto lin repagis!

Lia filo, lia kara Janko, dorlotulo kaj ĝojo de ili ambaŭ, malsaniĝis je diferio. En la unua momento D-ro Zawirski ne timis. Tiam da infanoj li estis kuracinta de tiu terura malsano per injekto de serumo aŭ eĉ ekstreme okazo per operacio. La rezultato estis ĉiam senduba: se Dio donos, li sanigos ankaŭ la filon.

Li aplikis ĉion provizore bezonan, kaj la infano sentiĝis pli bone. Sed bedaŭrinde, kiam la devoj de l' praktiko elŝiris lin por kelkaj tagoj el la hejmo, la infano ekhavis fortegan krupon; la voĉon ĝi havis ronka; atakoj de sufoko sekvis unu post alia, ĉiam pli ofte.

Kia terura reveno! Li revenis post kelktaga foresto en malproksimo, kovrita de neĝo; sur la urbolaco li ankoraŭ havis momenton, por elserĉi en vendejo ludilojn por Janko por kristnasko: li estis apertanta al li lignan ĉevaleton kaj trumpeteton kaj ridetis al si mem, pensante pri sia feliĉo.

„Fine!“ ekris la edzino, kiam ŝi pala kaj tremante elkuris por konkoni lin.

„Kio okazis?“

„Venu rapide! Janko...“ Ŝi ne finis pro larmo.

Li tuj komprenis la minacajn situacion kaj aplikis rimedojn plej energiajn. Refoja injekto de serumo ne efikis. — La sekvan tagon neniam

La posedanto eĉ ne memoris pri siaj arbaroj. Foje la bienadministristo estis dirinta al li:

„Estus necese malpliigi tiun ĉi arbaron, oni havus lignon kaj teron por kampoj.“

La maljuna bienposedanto estis svinginta la manon:

„Ne valoras. Ne valoras la laboron kaj elspezon. La infanoj faru ĝin!“

Kaj kiel antaŭe la arbaro bruis en milda somera vespero kaj muĝis en aŭtuna ventega nokto. Ĉiu tago faris grandajn ŝanĝojn en tiu ĉi senlima ebenaĵo: miloj kaj centmiloj da kreskajoj kaj bestoj naskiĝadis, kreskadis, sentadis la pasion de l' juneco kantante kaj florante en varmegaj printempaj noktoj, ĝis ili ree transvivadis sian viraĝon, maljuniĝadis, ruiniĝadis kaj mortadis. Sed anstataŭ tiuj pereemaj estaĵoj aperadis tuj miloj kaj centmiloj da novaj, kaj dum dekoj kaj centoj da jaroj ĉi tie ne estis sentataj ŝanĝoj. Ĉi printempe la tero en la arbaro kovriĝadis per juna herbo kaj la arboj per folioj, la aŭtuna vento denove forportadis ilin, kaj ree plonĝemadis la vintra vento en la arbaro. Neniu-nova kaj fremda sono iremigiĝis ĉi tie la aeron. Silento aŭskultadis silenton, silento paroladis kun silento, sed silento ne kreadis sonojn — nur silenton.

II.

Jaak estis jam pli ol kvardekjara. Jam dudek kvin jarojn li servadis la bienon. Lial manoj estis malglataj kaj la frunto sulkiĝinta. Malaperintaj estis la ruĝo de liaj vangoj kaj ĝojo el la okuloj. Kaŝema estis lia koro kaj malmultaj liaj paroloj.

Ju malpli li paroladis, des pli persiste li okupadis sin pri siaj pensoj. Multe da tiuj li ne havis, sed ili estis liaj propraj.

Kiam li, lacigita de malfacila laboro sur la fremda kampo, sidigadis por momento sur la kampando, tuj lin ekokupadis tiuj pensoj — la pensoj pri propra kampo.

Matene kaj vespere dum krepusko, paŝante post la dormemaj bovoj, li pensis pri tiu kampo.

Kaj vespere, enlitiĝante kaj kovrante sin per la litkovrilo, li revis pri sia propra hejmo. Li vidis, kiel li en senarbigita loko elradikigas arbustumojn kaj bruligas ekkulturotan kampon, kiel arbetajerpilo pasas trans arbostumpojn kaj ŝtonojn, kiel ĝermantaj semoj falas en la bruligitan teron kaj ekreskas, kiel falĉilo fajfas kaj rikoltilo siblas, kiel draŝilo batas kaj pezaj greneroj falas tra la kribrilego sur la plankon de draŝejo. Kaj li ekkormis havante antaŭ la okuloj malgrandan flavan domon inter tremantaj tremoloj eĉ la rando de ebenaĵo.

Sed li ne naskiĝis nur revemulo. Jam de la infaneco li sciis, ke domo ne donas novan veston, nek songado silkan robon. Dum jaroj li estis ŝparinta kopekolojn, kaj kiam li estis kvardekjara, li jam havis sur la fundo de sia kofro en malnova lana ŝtrumpo ducent brilajn arĝentajn rublojn. Kaŝite de fremda okulo, li ofte denombis ilin en malluma angulo de sia ĉambreto kaj aŭskultis, kiel la arĝentaj moneroj falis kaj rinitis. Tio batigis lian kordon, kaj li sentis, kvazaŭ estus senfine multe da mono kiel en rivero, el kiu elfluas arĝento.

Jaak petis kaj ricevis por si pecdon da tero en nekulturita arbaro. Sed por tiu terpeco li devis ankoraŭ sensalajre servi la bienon dum du jaroj.

„Nu, ni vidu, kiel vi vivos tie en la arbaro,“ la bienadministristo estis dirinta. „La bienlaboron

ŝanĝo. Eble li malbone esploris, la plej malgranda eraro povus sekvigi katastrofon...“

Rapide li decidis. En la plej proksima pli granda urbo estas du liaj kolegoj. — Jam post momento en glitveturilo kuregis servanto kun letero. Post kvar horoj ili povas esti ĉi-loke. Kaj efektive ili venis — sed nur por konstati, ke kuracista sciado ĉi tie jam estis senforta.

Restis nenio, krom atendi... atendi kion? Granda Dio! — Ĉu tio estas ebla?

Li iris en la ĉambrojn, kie kuŝis la etulo. Stefanino tenis la manon de la infano, kliniĝis sur ĝin, paroladis al ĝi de tempo al tempo. Sur liteto disjetitaj senorde: trumpeteto, ĉevaleto, plumbaj militistoj jam ne aliris atenton de l' malsana infano. Vidinte la revenantan edzon, la patrino demandis lin per rompita voĉo:

„Kion ili diris? Estas jam neeble lin savi, ĉu ne?“

Li ripetis la vortojn de la pli maljuna kuracisto: Oni povas garantiĝi nenion.

„Do kion fari?“ ŝi demandis.

„Nenion; atendi...“ li respondis.

Li sidigis kontraŭ ŝi, eĉ alia flanko de la lito.

La malgranda Janko mortadis ion post ion. Li kuŝis elcerpita, senmove, preskaŭ sen febro, la atakoj ripetiĝis ion post ion pli malofte, li malfortigadis... ŝajnis ke kun preskaŭ ĉiu momento eliras da lia vivo. De tempo al tempo li suprenigis la svenajn paŝebrojn, kaj sub ili elrigardis grandaj, malklaraj pupiloj, ĝis antaŭ nelonge tiel brilantaj, polemaj, hodiaŭ mortaj, vitraj, sen esprimo, kiuj rigardis sed vidis nenion, senkulpa, malkonsciaj... Sur sia liteto li ŝajnis esti io tiel eta, tiel mizera, ke eĉ estis mirinde, ke la morto klopodis je tiu ĉi io.

vi ja faras, sed ĉu vi kuraĝos komenci vivon en la arbaro, tion mi ne kredas.“

„Nu, mi provu, mi provu.“ Jaak estis murmurinta, „laboron mi ne timas. Mi jam laboros, se mi posedos teron.“

Kaj kviete li laboris sensalajre tiujn jarojn. La aliaj laboristoj ofte vidis, kiel Jaak en sabataj vesperoj post longa taglaboro ŝteliris al la arbaro. Ne sentante lacecon, li iris al ebenaĵo troviĝanta je la distanco de kelkaj verstoj, kliniĝis tie sur arbostumpo kaj meditis pri la nova hejmo. Kaj revenante hejmen post noktomozo aŭ antaŭ matenruĝo, li murmure parolis kun si mem, kaj la aliaj vidis lian vizaĝon kvazaŭ lumigita.

Senpacience li atendis la tempon, kiam li liberiĝos de la bienlaboro kaj povos iri kun sia akra hakilo en la densarbaron.

Kaj la tempo alvenis. Jaak dungis maljunulon en la vilaĝo, jefis sur la ŝultron sakon kun salitaj klupeoj kaj pano, metis sur la alian ŝultron la hakilon kaj malaperis por kelkaj semajnoj en la arbaro.

III.

En frua printempa tago, kiam ankoraŭ blankaj neĝamasoj kuŝis sub la arboj kaj degelonta neĝo kaj glacio kovris la kavajojn, ekvekiĝis la virlupo timigite el la matendormo. Duonkuŝe li ŝteliris el la densarbaro sur la ebenaĵon por aŭdi pli klare la stranganĝajn sonojn, kiuj atingis lian orelejojn de malproksime. Singardeme li paŝis tra la arbetoj kaj alproksimiĝis al la senarbigita loko.

Ektiminte li haltis kaj elŝovis la kapon el junipera arbeto kaj ekvidis mirante, kiel du novaj estaĵoj, kiajn oni antaŭe en la arbaro ankoraŭ ne vidis, hakis la trunkon de maljuna pino, tiel ke la splitoj flugadis. Subite la pino ekmoviĝis antaŭ la okuloj de la lupro, ŝanceliĝis kaj balanciĝis, ekremis de l' supro ĝis la malsupro kaj falis kun granda krakado kaj bruo tra la ripozanta tremolareto sur la glaciĝintan teron. La lupro rapide forkuris en la arbaron, ne rigardante malantaŭen.

Sed la fraĵoj de la hakiloj ne ĉesigis. Sci-voleme la bestoj eliris al la rando de la ebenaĵo, elŝovis la kapon el la arbetoj kaj miris pro tio, kio okazas en la ebenaĵo. Tiam ili kunmetis la buŝegojn kaj bekojn kaj komencis pridiskuti la aferon. Tio estis io stranga. Neniu estis antaŭe vidinta ion similan. Tio antaŭdiris nenion bonan. Tio antaŭdiris malbonon al la ĝisnunaj loĝantoj de la arbaro.

Sed la afero estis daŭrigata. Ree falis alia pino, ankoraŭ pli granda, ankoraŭ pli forta. La gruo ekflugis kriante. La urso sin turnis malkontente en sia kuŝejo sur la alian flankon.

IV.

Estis la lastaj printempaj tagoj. La ruĝa sabata suno estis jam delonge malaperinta malantaŭ la arbaro. En vespera krepusko malgranda domo konstruita el senŝeligitaj traboj jam staris sur la rando de la ebenaĵo. Tra la fenestra iruo, kie ankoraŭ ne estis kadro, Jaak rigardis sur la mallumigantan ebenaĵon. Unuflanke juniperoj bluis en vespera nebulo, sed aliflanke nigris alia arbaro. Jaak pensis.

Li vidis junan hordeon ondulanta sur la ebenaĵo. Li vidis virinon kun suĉinfano sidanta sur la sojlo. Sed malgranda blonda knabeto ludis apud la muro griziĝinta pro pluvo kaj suno. „Tio estas mia familio,“ Jaak pensis kaj li eksentis ian strangan varmon en la koro.

Atako de sufoko estis ree venanta... ĝi skuis, kreviĝis la bruston. Patro kaj patrino observis maltrankvile, ĉu la spirito ankoraŭ revenos... ĝi revenadis, sed ĉiujfoje pli delikata, apenaŭ videbla. Tiel ili maldormos ĝis lasta elspiro, malesperaj, senmovaj en senespera atendado.

La nokto proksimiĝis malrapide, malumo ion post ion pleniĝis la ĉambrojn; samtempe la flamo de la lampeto brulanta antaŭ la honorinda vizaĝo de la Helamonta Sinjorino*) disjetis pli kaj pli helajn brilojn. La okuloj de Stefanino direktiĝis de tempo al tempo al la bildo: „Patrino savu!... Patrino savu!“

Fine ŝi leviĝis kun peno.

„Kien vi iras?“ ekdemandis la edzo.

„Bruligi lampon.“

„Kial?“

„Mi volas ankoraŭ unu fojon vidi lin vivan,“ ŝi respondis tiel mallaŭte, kvazaŭ ŝi timus sian propran voĉon. Kaj kovrante la lampon per lumŝirmilo, ŝi revenis sur la antaŭe okupitan lokon.

Horo post horo pasis; ili ĉesis kalkuli lin... Subite li malfertemte mallaŭte la pordon.

„Sinjoro! ia homo el R. volas vidi vin,“ murmure anoncis la servantino. Vilaĝeto R. situis je distanco de dek verstoj, eĉ la alia flanko de l' pinta arbaro.

„Mi eliros al neni, Mario, forigu tiun homon!“

Ŝi revenis post kelkaj minutoj. „Li ne volas foriri; li diras ke li nepre devas vidi vin.“

*) Helamonto = nomo de fama monaĥejo en Czeszochova kun miraklono k'uzanta bildo de la Sankta Dipatrino. Czeszochova signifas en Pollando tiom, kio Einsiedeln en Svisujo. Loreto en Italujo, Lourdes en Francujo ktp. — Rimarko de la tradukinto.

Li eliris en la korton kaj proksimiĝis per malrapidaj paŝoj al sia kampo, kie kreskis kelkaj sulkoj da termpoj kaj iom da hordeo kaj aveno. Tiam da tempo li estis havinta dum la konstruado de la domo por kulturi la kampon. Tiel enpensiĝinte Jaak ĉirkaŭiris la kampon, rigardis sian unuan grenon kaj paŝis fiam al la hejmo.

Proksime de la domo li ekhaltis, levis la kapon kaj rigardis longe la novan domon. Alte super la domo staris abia kruco, kaj sur ĝi balanciĝis krono el likopodioj kaj vakcinioj. Sur la muroj estis flavetaj tegmentotraboj. Mankis ankoraŭ tegmento. Longe Jaak staris kaj rigardis la domon. Li estis gaia kaj kontenta pri si mem. Tiam li eniris kaj kuŝiĝis apud la maljunulo sur la splitoj. Li aŭdis, kiel la maljunulo ronkis kaj kiel la splitoj sur la tera planko susuris.

Baldaŭ la viro dormis profunde kaj ripozis de la taga laceco.

Apud la muro de la nova domo, sur branĉo de paduso, malfrua najtingalo kantis siajn malnovajn kaj eterne novajn melodiojn, ploris kaj plendis, ĝojis kaj gajis.

V.

Alten super la arbaron ŝvebadis fumo. Levilo elradikigadis arbostumpojn kaj fajro briguligadis ilin je cindro. Oni hakadis la arbaron, kaj splitoj flugadis. Kaj tiel pasis la tempo.

Unu pluvan aŭtunan tagon la maljuna arbargardisto vizitis Jaak'on. Ili ambaŭ sidis antaŭ hejtata forno, ili tiradis per forkego baktitajn terpojajn el sub la cindro, blovdadis sur ilin kaj manĝis. Ekstere plimallumiĝis kaj la pluvo ankoraŭ plifortigis. Tiam la arbargardisto elprenis sian brandujon. Ili ambaŭ trinketis, kaj ilia humoro iĝis bona.

"Ho, kiel multe vi laboris!" laŭdis la arbargardisto.

"Jes, certe mi iom laboris," Jaak respondis, rigardante siajn malglatajn manojn.

"Nun vi havas domon kaj teron, nur la domo nun bezonas mastrinon!"

Jaak nur spiregis responde.

"Jaak plugos la kampon, la mastrino kuros inter bovejo kaj provizejo kaj la floroj ludos paŝtrumpeton; kio al Jaak tiam ankoraŭ mankos?"

Kaj la arbargardisto, la maljuna vaganto, sola kaj senhejma kiel lupo, ridegis.

Sed Jaak ne ridis.

Kiam vintre vento fajfemis en la arbaro kaj io kvazaŭ paŝis en la subtegmentejo, tiam li sentis timon. Li pensis pri ĉiuj laboroj farendaj, li turnis sin de unu flanko sur la alian sed ne povis trankviliĝi. Por kio li laboras? li pensis.

En la fino de la vintro li laboris en la vilaĝo kaj printempe en la bieno. Venante vespere tra la arbaro, li sentis odoron de degelanta iero. Li derompis branĉon de betulo kaj palpis per la fingroj, kiel la rezino alĝuiĝas.

Lia decido fariĝis ĉiam pli firma. Kaj se li ankoraŭ atendis, li faris ĝin nur tial, ke li estis kutimiĝinta atendi. La vivo estas tro serioza afero por facilnime rapidi. Kaj Jaak ne plu estis juna.

VI.

La muroj de la domo estis ankoraŭ blankaj, sed la komencan brilon forigis jam la suno kaj pluvo. La pordejoj kaj fenestroj estis ornamitaj per betulaj branĉoj. Alte super la paila tegmento fliris festoflago, sed sub la flago balanciĝis freŝa florkrono. Tra la malfermita fenestro estis aŭdita parola bruo de la homoj, kiel zumado de abeloj en abelujo.

D-ro Zawirski decidis fini mem kun la trudemulo.

En la kuirejo ĉe l' forno staris neĵuna montarano. La neĝo, kiu je dika tavolo kovris liajn brakojn, fandiĝis sub la influo de la varmeko kaj malsuprenfluis de lia vestaĵo. La montarano turnis al la mastro malgrasigan vizaĝon, ĉirkaŭitan de longaj, grizigantaj haroj.

"Estas vi, patro Tomaso? Kion vi volas?"

"Ho, malbonaĵo, sinjoro, mia bubeto moriadas."

"Ah, ĉu estas tio? Mi venos tien morgaŭ matene."

La montarano skuis la kapon: "Bonvolu pardoni, sinjoro konsilanto; sed ŝajnas al mi, ke sen vi la malgrasulo ne ĝisvivos la matenon."

"Mia malgrandulo ankau agonias... mi ne povas forlasi lin dum ĉi tiu nokto."

Ili ambaŭ eksciencis konsciente sian senfortecon kontraŭ la malfeliĉo.

"Jes, tio estas prava! la sinjoro konsilanto savados sian, ne mian."

"Ho!... la mia estas jam perdita!"

Ree fariĝis inter ili momento de surda trankvilo, kaj ree la montarano ĝin interrompis: "La mia ankoraŭ ne estas perdita... ĉi li diris, turniĝante sian ĉapelon en la mano. — Dio donis konsolon por maljunaj jaroj... jam duan oni ne ĝisvivos."

"Mi venos morgaŭ matene... certe... tuj matene... mi promesas al vi."

"Tro malfrue, sinjoro!"

"Sed permesu do, ke mi fermu al mia sola filo la okulojn! li ekbrilis kolere. Post momento li jam kvietiĝis. — "Cetere eble je meznokto... li aldonis.

Jaak festis sian edziĝon. Tio estis modesta geedziĝa festo. La parencoj de la fianĉino kaj la konatoj de Jaak sidis ĉirkaŭ la galantinoj. La maljuna arbargardisto sidis ĉe la fino de la tablo, havante antaŭ si botelon da brando. Finfine unu rakonton, li tuj komencis alian. Kaj tiel la ŝercado daŭris ĝis malfrua vespero.

Sed vespere la jungeedzino iris solaj rigardi la kampojn. La fianĉino estis serioza kaj silenta. Ŝi jam ne estis iuna kaj ŝi estis malriĉa, sed Jaak sciis, kun kiu li sin ligis.

Ili ĉirkaŭiris la kampon kaj ekhaltis ĉe la arbaro, de kie ili povis vidi la grenon kaj la domon. Ili rigardis ĉion ĉi dum momento silente kaj ekparolis pri siaj intencoj rilate la estontecon.

Multe ili devos ankoraŭ labori! Tio estis nur komenco, kion oni vidis ĉi tie. Konstruadojn ili devos konstrui kaj kulturi la teron, havigi al si brutaron kaj arangii la mastrumadon. Nun ili estas ankoraŭ duope, sed kiu scias kiel longe? Ĉion ili devos pripensi. Labori ili volas kaj esti bonmoraj homoj, ĉar kia estas la vivo de homo, tia ankaŭ estas lia rekompenco.

La animojn forte pleniĝis la sento pri ilia devo. Ili faris en siaj koroj grandajn promesojn. Kaj iliaj vizaĝoj estis preskaŭ malĝojaj, dum ili staris tie. Kun permeso de la aŭtoro tradukis el la estona lingvo grupeto de Esperanistoj en Tallinn.

Motivoj de Sinajo.

"Kanti, kanti, kanti!... Popolo min atakas, aro krudepensa. — Oficom mi ricevis, fine. — La posteno de l' aŭgura kesteto, el kiu destinoj Eliras kanarioj laŭ vulgariaj sonoj De la gardo migranta de l' strato al strato. Kanti, kanti, kanti!"

Ni kantu!... Mi oficos... Aro kolektiĝu, De la majstro dungita aŝkulta kreacion. — Mi ne estos minstralo lunon atendanta, Por veti pri kanzonoj kun la najtingaloj. Ne atendas mi mute, ĝis la okcidento La lastan lignofaskon de l' tago bruligos, Kaj la grizevizaĝaj falos sur la teron Meditoj kaj silentoj etendante brakojn; Ne atendas mi, kiam la knabinoj lijoj Ruĝaj kiel papavo ektreros por rido Kaj la triloj de l' ŝalmo penetros en koron. — Mi kantis laŭofice. — La harpon aĝorditan mi tenas en mano. Aŝkulta la aro!..."

"Nekonata, Mistera, Kaŭzo de la kaŭzoj Kreis ĉion estantan — sin mem ankaŭ kreis. Nur Ĝi sola eternas — mondoj mortos ĉiuj! Mi mortos kun alio kaj tiel senreste, Ke ne havos mi tombon eĉ en rememoro! Kies penso alirus al mi jam senombra?... Ĉio pasos, nur Dio restos, Dio — Morio. Tiam en malekzisto Dio iĝos Granda, En potenco senlima fariĝos izola, Tute sola, terura profeto mistera, Senregna kaj senhejma Poeto kaj Koro."

"Homo, hundo sklavema!... surgenune staru, Klinu frunton humile kaj aŭdu la diron! Mi estas ilo maldigna; ne de mia brusto, De l' altaĵoj de trono de la Eternulo Akceptu la ordonojn, la scigojn sanktan: Unue — forton ŝatu, estimu profiton, Malfieru prudente — nur kaŭze de timo, Kaj masonu altaron de la sama granda, Kian havas najbaro — tie oferdonu! Due — vi ne postulu eĉ en lasta horo Atestojn de la koro via kaj — ne via, Mi, dungita profeto, per kanto pagita Gajnas por vi la pacan kaj kvietan dormon. Tria — bone memoru: se foje pro larmpoj Malsekiĝos vizaĝo, pro larmpoj malofitaj, — Ne tiuj, kiujn naskis ofendo eĝreno, Sed aliaj, naskitaj de l' mistera homo, — Preterpasu momenton iun plej rapide,

La montarano ĝemetis kaj samtempe ekrigardis malfide la doktoron. — "Kaj vi, sinjoro konsilanto, mem diris, ke ĉi tie vi povas jam nenon helpi."

La doktoro ko'eriĝis fine: "Ne, mi ne povas helpi? Kaj de kio vi scias? Ĉiukaze la infano vivas ankoraŭ, kaj dum ĝi vivos, mi ne ekmoviĝos — ĉu vi komprenas?"

La montarano ĉifis sian ĉapelon ambaŭmane, dum unu momento ankoraŭ hezitis, fine kun mallevita kapo malrapide iris al la porde.

"Ho, volo de Dio! Do estu do mortokazo," li murmuris, sed sen ribelemo, kiel oni akceptas ion neeviteblan.

"Atendu!" lin haltigis la kuracisto. "Ĉu li tusas sendese? La voĉo estas raŭka, ĉu ne?"

"Dum la tuta tago li tusis multe, nun nokte malpli. Ŝajnas al mi, ke tio estas signo de plibonfarto."

"Ne... Sed vi komprenas, tio estas mallebla... mi ne povas lasi tiel mian infanon... Kaj kiel spiras la via?"

"Li fajfas, ne troigite, simile al tiu vento, kiu petolas ie sur kampoj, kaj poste io kaptas la infaneton al gorgo kaj sufokas..."

"Tio sama, kio ĉe mia hieraŭ vespere... Kaj tamen tio estas malebla, ne postulu tion de mi! — Tiaj atakoj de sufoko estas oftaj?"

"Ho, ili ripetigas de tempo al tempo."

"Ha! mia kompatinda amiko, kiel mi kunsentas vin!"

"Tio... tiel... jam nenio estos de li..."

"Estos!" subite elgorgiĝis la kuracisto, kies okuloj strange ekbrilis. "Dio, mizerikorda Dio,

Ne permesu makuli forton per la ploro! Kvare por vi ordono: estu firmevola, Majesteco de l' venko lumu al vi ĉiam, Car ĝi eĉas mirakle, kaj vin tute lun Sur altaĵojn lokigas kaj kronas per laŭroj."

Profeto por moment' ĉesigis la parolon, Okulon estingitan turnis al la homoj, Kiuj staris ĉirkaŭe ĉifone vestitaj, Modestaj kaj fieraj, noblaj kaj malnoblaj, Rigardantaj obstine, krude kaj senpense, — Kaj denove la arojn iun atendantan Li ekvipis per flamo sanganta ekkrio:

"Ne ŝtelu sanktan fajron de l' frunto, de l' koro, Malbenitaj aruloj, aĉai scivoluloj! Ne konsumu la forton de l' vidpovo vera, Hundoj!"

Vi ne gustumos la karnon nutrigan... Ne mergu la aviden manon en kristalan Kaj silentan riveron de la melodioj! Ĝi boatojn ŝarĝitajn de viaj ĉifonoj, De via koto pura ne portos, ho hundoj!"

Kaj denove profeto ĉirkaŭten rigardis, Kaj estis malespero en liaj okuloj, Kaj palaj lipoj flusuris: "Aro, aro, aro!... Ne mortigu la cignojn sur kristala akvo!" Kaj la flustro sonigis la kordojn de l' harpo. Kaj granda homamaso staris ĝin ĉirkaŭe Profunde enpensis, kaj ĉifonojn proprajn Kaj frunton de l' profeto rigardis silente Kaj aŭdis de la harpo konfuzitan spiron. Kaj kantiisto denove pe koro ekensis, Ke plendo el profundo de tiu amaso Al li manojn etendas kaj demandas lace, Kiel gvidi ne volas li ilin antaŭen? Kiel harpo mallevis flugilojn sonorajn Kaj per bruoj standardaj ne aligas korojn? — Tial li longan tempon staris kaj hezitis, Silentis kaj rigardis fikse tiujn homojn Noblajn kaj malnoblajn, fierajn, humilajn... Ĉiujn kirpi kolektis la ara aspiro Vidi en li gvidilon, standardon kaj kreodon. Tial li fermis bruston kaj ekkris laŭde:

"Aŝkultu min la homoj! — Hodiaŭ la harpo Ne deziras obei, ial ĝi ne sonas! Fingrojn miejn lacigas ĝi hodiaŭ mire — Tamen... estu vi certaj Ke flugiĝos turmentoj viaj kaj mizeroj! Car estas celo ia, tre granda... proksime... Kvankam pri ĝi neniu ion klare diras, Estas celo tre glora, ĝi pagos nin ĉiujn. Estas dia distrikto — post la lakta vojo, Kien penso flagranta, kiel kap' kometa, Alkuras lecaspire kaj ekceptas benon, — Estas celo komuna, estas idealo, Estas pano mirinde bongusta por ĉiu, — Ĉies lango ĝin guos kaj ĉies palato. Iam... baldaŭ verŝajne... Tial al mia reto vi portu dolorojn. Portu vian korpejon, malĝojon kaj larmon! Sur flugiloj de l' kredo mi animojn viajn Kurbitajn, turmentitajn levos tra eieroj, Tra hele diafanaj vastaj laŭzaroj En landon de l' feliĉo kaj sur sinon Dian Mi lin metos mole gojajn kaj serenajn. Estas celo!"

Ĉesis kanti profeto. — Blankaj bran'aj tufoj De la arboj floran'aj balanciĝis mole, — Estis feste kaj sune. La alaudoj bruis Tre alte, kaj paŝistaj ŝalmoj gojaj estis. Ĉielo estis angela... Kaj Dio Bonkora induĝis la krimulojn... Estis vere rave... Kaj profeto sur harpo kunplektis la manojn, Maldolce ekridetis kaj estinge-palan Vizaĝon turnis morden, kie la eiero Viola tavoliĝas kaj fremdas al suno.

M. Kalina.

Solvo de la liter-enigma de la decembra "Distrado".

1. Greenwich, 2. Amsterdam, 3. Le Havre, 4. Verona, 5. Eisenach, 6. Solothurn, 7. Tarragona, 8. Omdurman, Nagasaki. — Galveston.

savu almenaŭ unu! — Kaj kvazaŭ sugestite, li kuris en sian kabineton, elprenis el ŝranko flakonon kun la fluidaĵo kaj reveninte en la ĉamburon, kie kuŝis lia filo, sin turnis al la edzino: "Se Janko suferus tro multe, donu al li ĉi tiun botoleton por flari... tio estas tio!"

"Kial vi tion diras al mi?"

"Ĉar... mi forvireuros..."

"Vi?... dum ĉi tiu nokto?"

"La malgranda knabo de Tomaso-geedzoj agonias. Eble mi sukcesos veni ĝustatempe."

"Kaj nia?"

"Nia?... la vivo de nia jam maldependas de homa povo. Eble miraklo... Preĝu!"

"Ne forlasu nin!" — "Mi devas!" Ŝi rektigis minace kiel lupino ŝirm-nia sian idojn.

"Vi ne amas vian filion... Vi ne amas vian edzinon... For!"

"Stefanino!" li ekkris. Doloro akra, proksima al frenezo, grimaciĝis liajn trajtojn. Vidante, ke la edzino lin ne komprenas, li kliniĝis sur la infanon kaj tuŝis ĝin per buŝo. La vizaĝeto estis ankoraŭ varma malgraŭ vaksa haŭtkoloro.

La doktoro fortege, kvazaŭ timante, ke povus manki volo al li, forŝirigis de la liteto kaj, ne rigardante plu posten, elkuris el la ĉambro.

Dumvoje ili ambaŭ silentis. Tomaso devis ĉiumentente antaŭenpeeli la ĉevalon per la kondukilo, ĉar ĝi haltadis, lacigite per la antaŭa vojo, — krome ĝiaj hufoj enprofundiĝis en la neĝo, kio malfaciligis ĝian iradon.

La doktoro tenis en la maldekstra mano saketon kun plej bezonaj iloj, per la dekstra li mehanike tiradis supren la ĉiam deŝovigantan

Plezuroj kaj ludoj.

Eltirajo el la nova verko de
Georges Duhamel.

Esti dio, tion mi scias. Jes, mi imagas la vivon de dio; certe ĝi ne estas tiel agrabila, kiel oni povus supozi, kaj nepre ne enviinda.

Ni promenadis, hodiaŭ matene, sur la ebenajo, Bernardo kaj mi. El la arbetoj mi detranĉis por li belan bastoneton, kiun li tuj perdis, kompreneble; kaj antaŭen! antaŭen! la tero estas nia!

Unue li prove ekmanĝis acidan pomon, poste malmolan piron, poste trodolĉan moruson, poste peccoton da beto. Post la beto, longa kaj detalzorga diskutado pri sukero: praktika leciono de generala vivado. Poste Bernardo (nomata „le Cuib“) ekmordas unu sekalan grajnon, unu avenan, du maizajn grajnoj, peccoton da ŝelo. Perbuŝe li konas la mondon: perfekta metodo. Fine li decidis provmanĝi terpomon kaj suĉi stoneton. Mi kontraŭstaris tiujn intencojn. Mi estas kompleksa dio; sed ĉiuj favoroj havas limojn. „Le Cuib“ iris silente kelkajn paŝojn, kaj subite li murmuris mallaŭtavocē: „Mi soifas.“

Laokaze, la tasko de la orelo estas precipe ne aŭdi. Mi rapidetas antaŭen kantante melodion konatan de la familio. La ebenajo vaste distendigas ĝis la horizonto; ĝi kuŝas tutnuda kaj nenion povas kaŝi. Maldekstre doruono brulbruniĝas pro la ardeĝaj sunradioj; dekstre betkampoj, kies velkaj folioj pendas melankolie. Antaŭ ni la sirato, kies ŝtonoj kvazaŭ dancetas pro la vibrado de l' flama aero. Tamen efikas la vento: ĝi delokigas varmegajn aeramasojn. Malproksime, ĉe la limo de la ebenajo, griza vilaĝo kaj farmdomo kun orangkolora tegmento subsune kviete boletas. Jen ĉio! Neniu sulkejo, kie fonto povus kaŝiĝi. Cetere, neniu fonto estas sur la ebenajo.

Belega tago! Mi kantetas la faman familian melodion kaj antaŭeniras decidapaŝe.

„Paĉjo, mi soifas!“

Ĉi tiuj fojnoj la afero estas klara. La voĉo estas kviete serioza, preciza. Nenion mi aŭdas! kaj antaŭen mi paŝas. Jen, mian manon ekprenas „le Cuib“ kaj, ĉe mia flanko trotetante, daŭrigas rapide ripeti: „Mi soifas.“ Tion oni povas diri proksimume kvindekfoje en ĉiu minuto; do, kvindekfoje li diras ĝin.

Kiom ajn granda estas la pacienco de Dio, la homaj preĝoj ĝin fine rompos. Mi sidigas sur flankon terbenkon, ekaptas ambaŭmane la knabeton kaj rekte, solene min turnas al lia saĝo: „Kion vi volas trinki? Nenion mi kunportis. Nenie estas fonto, nenie puto, nenie vilaĝo! Rigardu, rigardu! Estu prudenta, kaj vi trinkos, kiam ni rehejmiĝis.“

Inter miaj genuoj mi lin tenas. Li staras; li fikse kaj rekte rigardas al miaj okuloj kaj respondas: „Mi soifas.“ Kontraŭ tio, kiun kapablas fari la saĝo? La saĝo? Li estas prava. Ĉi tie ne estas akvo, sed li soifas. Li soifas sendube. Nu, kiu devas zorgi, ke ĉiu soifo estu kvietigata, se ne mi? Tio estas mia nepra devo. La verduluma rigardo alkrasas la mian, kaj la voĉo ripetas: „Mi soifas.“

Nu, bone! antaŭen sed kion fari? kion respondi? Ĉu la saĝo jam ne montrigis senefika?

La knabo pli pene paŝas. Li ekĝemetas, ploretas. La „mi soifas“ alitoniĝas, alirapidas, alisonkoloriĝas, min postkuras. Ĝi min senripoze ataketas, mian kapon iom post iom trapenetras, miajn ideojn konfuzas, ilin forpelas, ilin anstataŭante per sia unutonajo.

Eta inciĝo. Nova halteto. Jen, dufoje, la etulo estas inter miaj genuoj. Li estas alloga, ruĝeta, kun ŝvitgutoj ĉe la nazflanko. La verda rigardo ardegas. Palpebrumante, min okulumas strange la hometo: Li konas sian ĉarmkapablon, la krimuleto! li ĝin ekspluatas. Li klinetas sian

kapon; saliva fadeneto kunigas ambaŭ apartigitajn lipojn.

Perdita peno! La „dio“ estas ja senpova, sen fluidaĵo mi ja estas kaj ĉiuj tiuj logemaj klopodoj el mi nenion eldevegias.

Ni denove ekmarŝas. La juna frunto sulkiĝis aŭ, almenaŭ, ĝi latieble penis julkigi. La maneto buliĝas en mia mano. Ankoraŭ du- aŭ trifoje la infano diras minacatone: „Mi soifas.“

Tio estis ultimato. Sed kion fari? Mi ekrapidas, kvazaŭ nenio okazis, jen ĉio.

Iom post iom la „mi soifas“-krioj malofitiĝas. Fine unu plia, sarkasma, sed la lasta. La infana vizaĝo duone malstreĉiĝas. Mi atente kaj elsube rigardas lin kaj provas kompreni. Se la vizaĝo estus tiu de plenaĝulo, ĝi esprimus, sen ia dubo, miksaĵon de disreĝiĝo, kolero kaj ironio. Ĝi signifas proksimume jenon: „Resume, mi soifas. Jen la plej certa: mi soifas.“ Ĉi nenion povas ŝanĝi en la afero. Ĉio, kion ĉi diros, neniel helpos. Malbona dio! Kompatinda dio!

La promenado finiĝas sen alia okazeto. Evidentiĝas ia embaraso komparebla al diplomata krizo.

Hejmen reveninte mi trinkas abunde. Por la knabeto la afero ne plu urĝas. Districte li englutas duonan glason da akvo kaj elkuras, por forpreni de Mario la radgiliton, kiun ŝi uzis senpermeso.

* * *

... Li falas de sia radgilito, li falas trete forte, li tuj releviĝas kaj angore ĉirkaŭrigardas, ĉu kompatemulo najbare staras. Ne estas eble plori senhelpe, senpublike . . .

Neniu! La pretektantaj dioj aliloken rigardas, aŭ ŝajnas tiel. Ili nenion rimarkis; ili estas tre malproksimaj. Jen la hometo decidis ne plori; estas pli simple, kaj li denove ekludas . . .

* * *

Hodiaŭ, grandega rekompensa tago. Ni vizitos cirkon, Bernardo kaj mi. Cirko estas celo; sed la vojo ankaŭ meritas atenton. Ni nenion rezignos. Oni tuj vestiĝos. Oni aŭdos la paŝojn nombranta la promesitajn ĝojojn: plezuro! kaj eĉ se oni iom ploretas, ĉar estas necese lastmomente lavi la manojn: plezuro! tamen plezuro! Ravo de la strato! por kio, laŭ via opinio, tiu hometo naskiĝis? por bruegi, por kuri kaj precipe por salteti sur unu kruro: dia plezuro!

Infano, kiu saltas sur unu kruro, ne konas plu sian patron. Saltante sur unu kruro oni almitias la mondon. Sed kion? Jen subite la maltimegulo ĉe mia flanko! Jen subite la maneto mian manon nerve premas. Kio okazis? neutile serĉi: Mi estas certa, ke proksimiĝanta granda hundo ektimigis mian almitianton. — Kompren-eble! Mi tenas la malgrandan manon en la mia. Grandaj hundoj estas perfekte ridindaj. Kia fierega plezuro estos preterpasi tiu proksime grandan hundon premante la manon de paĉjo!

La aŭtobuso ankaŭ plaĉas. La sinjoreto ekgenuas sur la benketon kaj rigardas ĉion videblan . . . Iom post iom, la malvarmeta vitro maldiafaniĝas, ĉar la elspirado surmetiĝas kiel delikata vaporajo. La knabeto malproksimiĝas, kaj mi ekvidas sur tiu nebuleto la desegnaĵon de la jus algulita buŝeto kaj supre malgrandetan rondon: la nazon.

Ni nenion rezignos, mi jam diris al vi. Li sopiras la cirkon, sed ankaŭ la frandajeton antaŭe aĉetotan, kaj same la diverskolorajn surprizaĵojn en la montraj fenestroj de la butikoj, plie la ore-ruĝajn fiŝojn en la tageto de la trapasota publika parko. Vidi ore-ruĝajn fiŝojn valoras ekskurseton.

Kion diri al vi? Tio estas niaj unuaj eliroj kune farataj. Li estas entuziasmega, mi eksciita. Mi kondukas precize kiel ĵunleto, kiu unufoje promenadas kun sia belulino. Mi fariĝas malprudenta, mi pagas sendiskute kaj ne kontrolas la redonitan monon.

„Ne, mia amiko! la hodiaŭan noktan vojon neniu povas al mi rekompenca.“

La hejmveturo estis ankaŭ silenta, sed la vojo viveca kiel malofte. Ĉi momente oni renkontis grupojn, irantajn kun lanternoj. En la arbaro ankaŭ brilis ĉi tie kaj tie lumetoj. La vilaĝanoj el najbaraj vilaĝetoj rapidis al la Paŝtisto-Meso.

Kelkaj kantis hore malnovajn kristnaskokantojn. Kaj kiam ili preteriris la glitveturilon, ili kriadis ĝoje: „Ĝajajn festotagojn!“

Doktoro Zawirski nenion respondis, kaj la maljuna Tomaso, tute okupita per la pensado pri sia savita solulo, ŝajnis ne aŭdi la ĝojajn voĉojn.

Ili preterveturis malgrandan urbeton. Sur la placo, kontraŭ la preĝejo, inter du brulantaj lanternoj, staris kruco, kaj sur ĝi pendis laŭnature granda figuro de Kristo suferanta. Lia nuda korpo ŝajnis kuintirigi sub la malvarmaj flokoj de neĝo, sed el la okuloj elfluis torentoj de senmezura dolĉeco kaj amo sur la homojn, sur la mondon . . .

El la fenestroj de la sanktejo eligadis luma brilo . . . / Naskiĝis Dia Infaneto —, rememoris en ĉi tiu momento la doktoro, kaj lian koron subite pleniĝis senmezura kompatio. — Ĉi ankaŭ suferadis . . . Ĉi suferadis, Kristo! — — —

En la animo de l' doktoro okazis ia siranga ŝanĝo. La tuta vico de la antaŭaj tagoj, la kor-doloro, la malespero fandiĝis iom post iom per-

Jen la cirko. Oni eniras, akceptata per „cirka muziko“. Poste mi eble klarigos al vi, ke ekzistas kvar specoj de muziko: la „cirka muziko“, la „festa“, la „kinematografia“ kaj la „vespera“.

Poste mi tion klarigos al vi, poste, ĉar jen estas jam la burleskulo. Plezuro sekvas plezuron rapidege, kaj ni deziras nenion perdi. Ni aĉetas programon. Sur la programo estas desegnaĵoj de bestoj kaj cirkestistoj. Oni tiel atente rigardas tiujn bildojn, ke iafaje oni forgesas rigardi ia realajn estaĵojn moviĝantajn sur la areno.

Inter la programaj paĝoj, ni trovas kartonan hometon, kies arrikhava kapo facile moviĝas. Ni orde procedu: mi enposiĝas la hometon; estas rezervaĵo por la aŭtobusa reveturado.

Antaŭzorgi la estonteco estas saĝe kaj prudente: la estanteco estas ja tiel ĝojorica. Tamen Bernardo tute ne konsentas; li ripetas ĉiuminute: „Donu la hometon!“ Dum pli ol du horoj, li estas vidonta grandajn mirindaĵojn: ĉevalojn, tigrojn, elefantojn, akrobatojn. Bonege, sed tio ne sufiĉas. Meze en la multaj plezuroj, li revas obstine pri tiu simpla ludilo, kiun mi kaŝas en mian poŝon, kaj li mumuretas en mian oreleon: „Nu, paĉjo, nu! Montru la hometon!“

Tamen la prezentado daŭras inter ridoj kaj krioj. De la arkajo falas konfuza muzika ondo: Fluteo enaĝas, dronas, reaperas. Taga luma luktas senkonfide kontraŭ malrespektigaj elektraj astroj. La knabeto perdetas la saĝon meze en tiu haoso blindetiga kaj sonora. Li ridas, li aplaŭdas freneze. Kiam la „kolorigita, kalikota elefanto“ tro alproksimiĝas nian lokon, Bernardo subite ekaptas sian ĉapelon kaj diras: „Ĉu baldaŭ la tigroj?“ Kaj kiam la tigroj aperas, li postulas: „Kaj la ĉevaloj? ĉu ili revenos, la ĉevaloj?“

Oni neniam povas antaŭe diri, kio lin amuzos. Li havas motivojn, kiuj ne estas la niaj. Li faras misteran elekton. Iafaje li malatentas la batalon, revas, okupiĝas pri sia ŝuo, iafaje li aparte ridas, en la ĝenerala silento, kaj por tutpropraj kialoj. La mortosaltoj de la gimnastikistoj lasas lin indiferentia. Kompense, la masega orkolora fekaĵo, kiun la ĉevalo demetas sur la maton, suĝstias al li rimarkojn sagacajn, kompentajn.

Jen la ekvilibrato nigre vestita. Li grimpas, nur permane, ĝissupre de la arkajo, ĝis la kapturniga „trapezo“. Li metas unu piedon de l' seĝo sur glason, kiu kraketas, kaj sidigas sur ĝin preskaŭ en libera aero.

Mi ne ŝatas tiujn malpripaŝojn. Fingre deteneme, sed klare, mi mansiĝas al la artifikistoj; mi komprenigas lin, ke tiel sufiĉas ke li povas remalsupreniri.

Bernardo ne emociiĝas. Li ne komprenas. Li diras, tute saĝe:

„Kial li estas tie, supre? Kion li faras tie, supre?“

Centfoje li estas prava, la etulo. Interne furioza, mi superregardas tiun cirkan publikon: ĝi spiregas pro plezuro, ĝi stertoras mallaŭte. Estas la ĉiama publiko, la publiko de la religiaj punbruligoj kaj de la sangaj bataloj.

Bernardo mallevas sian kapon kaj tute seninteresiĝas pri la ekvilibrato; li foliumas la programon kaj nombras la aŭtomobilajn reklamilojn . . .

... Kaj jen la cirka prezentado finiĝis jam. Ni revenas flanko ĉe flanko en la aŭtobuso. Bernardo, laca, eĉ ne ekspensas postuli la kartonan hometon kun la arrikhava kapo. Mi donas ĝin, malavare; li amuziĝas ĝishejme.

Malfruas. Oni banas la etulon kaj li rapide vespermanĝas. Dum la panio lin enliitiĝas, li rakontas siajn impresojn de la tago kaj atentigas speciale pri okantajĵoj, kiujn mi tute ne rimarkis . . .

Kun afabla permeso de la aŭtoro kaj eldonistoj tradukis el franca lingvo P. Bouvier, Genève.

pelton, kiun antaŭvidanta Mario estis metinta en la glitveturilon.

Post unuhora veturo, la glitveturilo subite haltis antaŭ soleca dometo. Ŝajne iu interne ekakidis la sonoriletojn, ĉar la ponto malfermiĝis, kaj sur la sojlo monriĝis virino. Ŝi tenis lampon, ŝirmante zorgeme la flamon kontraŭ la vento.

„Ĉu estas la doktoro?“ ŝi ekdemandis. — „Estas.“ — El ŝia brusto elpenetris krio de malpeziĝo. Rapide ŝi ekiris antaŭen kaj kondukis la du virojn en ĉambron, kie el angulo aŭdiĝis morta stertorado de la infano.

Pasis tri kvaronhoroj . . . La doktoro kunmetadis la ĥirurgiajn instrumentojn kaj prepariĝis por foriri.

„Ĉu li vivos?“ demandis la virino.

„Ŝajnas al mi. — Morgaŭ mi estos refoje ĉi tie.“ „Do sinjoro konsilanto volas reveturi?“ demandis Tomaso.

„Tuj.“

„Car bonvolu pardoni, sinjoro, la bruto lacigis treege.“ li diris gratante sian kapon. La vilaĝano, trankviligita koncerne al la infano, nun zorgis pri sia havaĵo. Tamen li estis kortuŝita kaj komencis disvolvi el malpura ĉifono profunde kaŝitan ormoneron, verŝajne konservitan por la „nigra horo“. Li enmanigis ĝin al la doktoro, sed ĉi tiu eksciigis.

dante siajn, la animon vundetantajn konturojn. Sento de dolĉeco kaj de ĝis nun nekonaata paco plenversadis lian koron. La penso pri Janko lin ne forlasis eĉ dum unu momento; sed en la doloro, kiun al li kaŭzis la memoro pri li, estis nenia maldolĉeco. Kaj li miris pri si mem, ke li povas kviete, sen furioza ribelo pensi pri tio, ke li jam neniam vidos la filon kun flamo de vivo en la beleĝaj okuloj, ke mankos al li tiu ora radio, kiu estis beligo de liaj tagoj.

La glitveturilo haltis antaŭ la domo. La doktoro kuris en la ĉambron. De la sojlo spiregis al li dezerto kaj malvarmo de l' morto.

Apud la kadavro de la infano, senforte kilnante la kapon sur ĝian korpon, genuis la patrino. Li ekgenuis apud ŝi . . . kaj dum longa momento restis en preĝa koncentriĝo.

Fine li stariĝis. Li eklevis la edzinon per forta brako, kun boneco.

„Stefanino . . . amata mia!“ li diris alpremetante ŝin al si.

„Vi ne ĉestis!“ ŝi plendis al li malespere pleregante.

Sed post momento la frankvilo de la edzo transiĝis ankaŭ al ŝi. Kun plena fido ŝi alpremiĝis al lia flanko, sentante, ke en ĉi tiu brava koro ŝi trovas sufiĉe da kuraĝo kaj forto por suferadi plej grandajn dolorojn de l' vivo.

El pola lingvo tradukis Leon Poplawski.